

NIA PONTO

Grupo Esperantista

Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre

48005-BILBAO (Hispanio)

Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

TTT-ejo: esperantobilbao.tk

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

💻 esperantobi@gmail.com

Jar-kotizoj: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.

BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

JANUARO/FEBRUARO 2013

Nro. 94 (1/13)



Eduardo Larrouy 100-jara

Mallonga biografio pri Eduardo Larrouy.

La venontan 9-an de marto, nia kara amiko Eduardo Larrouy iĝos 100-jara. Okaze de tio ni prezentas resumon de lia biografio, sufiĉe ampleksa kaj interesa por pleniĝi tutan libron:

Kiel dirite, li naskiĝis la 9an de marto 1913, en Haro (La Rioja), ene de familio, kiu devenis el franca Vaskio. Tre juna li jam interesiĝis pri Esperanto, tiel ke en la jaro 1932 (19-jara) aliĝis al kurso gvidata de la elstara esperantisto de Bilbao Alberto Díaz Chapartegui (patro de Amador Díaz, kiu poste estis prezidanto de Brita E-Asocio).

Laŭ rakontis Eduardo mem, la komencoj estis jenaj: ene de amika rondeto, kiu kuniĝis la dimanĉojn por ĉeesti dancejon kaj trinki, laŭ la bilbaoa kutimo, kelkajn glasojn da vino, Eduardo ekparolis pri sia deziro, ke konvenus la ekzisto de komuna lingvo inter la homoj; tiam, unu el la amikoj respondis ke tiu lingvo jam ekzistis: Esperanto; ĉar tiu amiko havis esperantistan konatulon, kiu apartenis al anarkisma grupo de la strato "Zabala". Tiu sama amiko ankaŭ diris ke alia grupo (oni povas diri "neŭtrala") troviĝis en la strato "Iturribide".

Tien iris Eduardo. Sur la faŝado troviĝis la sama stelo, kiu ankoraŭ nun ornamas la balkonon de la nuna sidejo de la E-Grupo de Bilbao. Al Eduardo akompanis amiko, nome, Saturnino Montero, kiu poste mortis dum la hispana milito. La ejo estis ege malluksa, kun lampglobeto, kiu pendis el la plafono per simpla fadeno.

Eduardo aliĝis al tiu lernojaro 1932-33 kaj, hazarde, je la fino, estis elektita por legi paĝon de libro (tiama kutimo) kaj ricevis libron subskribita de la instruisto, libro kiu ankoraŭ staras ĉe liaj hejmaj bretoj.

La sekvontan lernojaron, li estis jam intruisto kaj en la jaro 1935 eniris la estraron kiel voĉdonanto. Kaj alvenis la hispana intercivitana milito. Kun ĝi, tre malhelaj jaroj por la E-movado kaj por la tuta popolo en Hispanio. La armeo de Franco eniris Bilbaon en junio 1937; la E-Grupo fermiĝis. Pro timo, la libroj de la biblioteko estis kaŝitaj; okupiĝis pri tio Sro. Olalla, kiu kunportis ilin al hejmo de Sro. Elizondo en Bilbao kaj poste, al vizkaja vilaĝo "Trucíos", kie Sro. Elizondo havis alian domon. Dume, Eduardo partoprenis la militon.

Post esti venkitaj en ĝi, Eduardo, kiel aliaj esperantistoj, travivis diversajn malagrablajn spertojn, kiuj sufiĉus por pleniĝi romanon kaj ankaŭ anekdotojn rilate Esperanton: Li estis kaptita en Santander kaj enkarcerigita en la sportejo de "El Sardinero"; tie li havis la okazon instrui Esperanton al aliaj malliberuloj, konkrete, al 8 el ili.

Post Santander, li estis enkarcerigita en la universitato de Deŭsto (Bilbao) kaj kiam okazis la ribelo en la fortikaĵo "San Cristóbal" (apude de Pamplona) oni veturigis lin al koncentrejo de Miranda de Ebro (Burgos), speciale rezervita por la membroj de la "internaciaj brigadoj"; tie, sur koridoro, li aŭskultis paroli Esperanton al du malliberuloj

(unu germana, la alia bulgara) kaj alparolis ilin; sed tuj alvenis gardisto, kiu disigis ilin per kriegoj kaj pafilfrapoj; Eduardo ne plu vidis ilin.

De Miranda oni veturigis lin al Aranda de Duero (Burgos), Almedralejo (Badajoz), Mérida, Campanario kaj Castuera, kie troviĝis la militfronto.

Li sukcesis survivi tiujn ege malfacilajn jarojn ĝis kiam alvenas nova epoko, en lia vivo kaj en la vivo de la E-Grupo de Bilbao:

Iom post iom la esperanta movado renaskiĝas en Bilbao; je la komenco, ĉar ne estis leĝa, kelkaj esperantistoj kuniĝas kaj parolas, dum promenado, ĉirkaŭ la “Nova Placo” de Bilbao; en 1957 la E-Grupo povas denove, laŭleĝe malfermi siajn pordojn; tiel ke Eduardo laboras en Madrido kaj revenas al Bilbao nur kelkajn semajnfinojn, li ne povas ĉiutage partopreni la grupan vivon, sed li ne perdas la kontakton kun la esperantistoj de Bilbao.

Post lia emeritiĝo, eblas al li dediĉi pli da tempo al la Grupo; en la jaro 1979 li fariĝas Prezidanto; tamen, jam de antaŭe li apartenis al diversaj estraroj kaj ankaŭ poste; ankaŭ ege aktive (li estis la ĉefa motoro, kune kun Pedro Benedicto) partoprenas en la organizado de la 75-a datreveno de la fondiĝo de la Grupo (1981), kio okazigas kongreseton en Bilbao, kun partopreno de esperantistoj el la tuta Hispanio.

Same, lia laboro estis tre grava por la sukceso de la hispana kongreso de la jaro 1989 kaj de la eŭropa (2004), precipe pro liaj demarŝoj ĉe la aŭtoritatoj.

Dum la lastaj jaroj li partoprenis preskaŭ ĉiujn kongresojn universalajn kaj hispanajn. Li estas nun la plej aĝa HEF-ano kaj la plej aĝa partoprenanto en UK.

Eblas daŭrigi kaj neniam fini ... Kiel fermo, nur diri kiom multe ni ĉiuj devus lerni el lia entuziasmo kiam temas pri E-aktivado.

Omaĝo al Eduardo.

Okaze de tiu 100-jariĝo, la venontan **sabaton 23-an de marto**, ni renkontiĝos ĉe la restoracio “Bikandi” (str. Somera, 21-Bilbao) por kune tagmanĝi kaj fari modestan omaĝon al nia amiko Eduardo. La prezo estos 35,00 eŭroj. Ĉiuj, kiuj deziras partopreni tiun tagmanĝon bonvolu informi **antaŭ la 8-a de marto** kaj enkontigi la monon, en la konto de la E-Grupo; tiuj, kiuj loĝas ekster Vaskio pagos surloke.

El próximo **sábado 23 de Marzo** nos reuniremos en el restaurante “Bikandi” (Somera,21-Bilbao) para celebrar los 100 años de nuestro amigo Eduardo Larrouy. Quien esté interesado en acudir, que lo diga **antes del 8 de Marzo**, pues debemos decir al restaurante el número exacto de comensales. Precio: 35,00 euros (Se ruega hacer el ingreso, en la cuenta del Grupo, antes de esa fecha. Los que residan fuera del País Vasco, pagarán en el mismo restaurante).



ZAMENHOFA FESTOTAGO.

Sur la foto, la partoprenantoj en la Z-festotago, kiun ni okazigis la sabaton 15-an de decembro en nia sidejo. Krom la kutima komuna vespermangxo, ĉi-jare estis prelego pri la historio de E-o en nia provinco fare de Jesús M. García. Kaj, ankaŭ kiel kutime, ege agrabla kamaradeca etoso.

KRISTNASKA LOTERIO.



Stariĝis tradicio: la kristnaska loterio ludata de la E-Grupo ne ricevis premion.

Tamen, ni kontentiĝas per la penso ke la ĉefa celo de tiu ludo estas monhelpi nian asocion kaj kontribui al pliviglo de la kontaktoj inter ĝiaj membroj.

Koran dankon al tiuj, kiuj aĉetis la biletojn kaj, tre speciale, al tiuj kiuj mendis ilin de ekster Bilbao.

Aŭtuna Renkonto de euskaj esperantistoj en Irunjo.

Fiksita la renvevuo por la 12-a horo ĉe kafejo Iruña komencis per aperitivumado la Aŭtuna Renkonto 2012-a. Tiu 1-a de decembro estis frosta sed sennuba tago en Irunjo do oni ĝuis sufiĉe bonan veteron. Aitor Arana el Azpeitia, Maritxu Arruti el Donostia, Rafa Blanco el Caseda, Miren Elizagarai el Barañain, Josu Herrarte el Arrasate, Xabi Rico el Gasteiz kaj Nikolas Xil el Tolosa estis la jam kutimaj vizaĝoj, kiu estiĝis kaj ĝuis bonegan etoson.

Bonan menuon, kun ebleco elekti vegetaranajn pladojn, oni gustumis en la restoracio de la “Herriko Taberna” kvankam bedaŭrinde la loko estis tro plena kaj brua kiu malfaciligis glatan babiladon. Sed tio estis bone kompensita dum la postmanĝo en la kafejo Niza. Aitor Arana informis nin pri kelkaj interesaj projektoj kiujn nun li disvolvigas:

- La dum jaroj prilaborata Eŭska-Esperanto vortaro kiu marŝas nun al finpretigo kaj eldonado. Oni antaŭvidas ties aperon post du jaroj.
- La ĵus naskita eldonejo “Libroj Haranaga” kiu eldonas en la eŭska, la romaa kaj en Esperanto. En nia lingvo ĝi debutis per la aperigo de “La portreto de Dorian Gray” de Oscar Wilde tradukita de Aitor mem.
- La kolekto “Luna Lumo” pri infanrakontoj tradukitaj el la eŭska, kiu konsistos komence el 13 volumoj kaj aperos ĉe “Libroj Haranaga”.

Kiel pinto li afablis donacante al ĉiu partoprenanto ekzempleron de “La portreto de Dorian Gray”. Kelkaj profitis por aĉeti kroman ekzempleron por donaci al amiko kaj mi profitas la okazon por informi ke la libro aĉeteblas en la libroservo de UEA.

Tuj poste Josu Herrarte informis pri la en Burgoso organizita, fare de la sindikato Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (CGT), ekspozicio titolita “La lingvo kiel liberigilo: Esperanto. La kulturoj de la libereco en la ibera anarĥiismo”. Li disdonis diversan priekspozician materialon: afiŝoj, flugfolioj kaj katalogoj, kies kvalitoj enhava kaj laŭaspekta estas substrekindaj.

Fine oni prikomentis la novaĵon ke Joxemari Sarasua jam trovis eldoniston por sia traduko de “1984” de George Orwell kaj ke oni povas esperi pri baldaŭa apero de la libro.

Amuza anekdoto okazis kiam kelnero haltis apud nia tablo kaj senĝene restis aŭskultanta nian babiladon. Mirigitaj ni lin rigardis kaj demandis ĉu io misas kiam li surprizis nin dirante kun argentina akcento: “Tio estas Esperanto, ĉu ne? La lingvo de la polo Zamenhof”. Nia miro pli kreskis sed tuj poste la mistero estis senvualigita kiam li informis nin ke antaŭ multaj jaroj li eklernis la IL-on. Sciinte ke movado pludaŭras kaj viglas li asertis ke estas la momento “repreni la aferon”. Ĉu venontfoje ni trovos esperanto-parolantan kelneron en Irunjo?

Iom antaŭ la disiĝo oni preparolis pri la venonta renkonto kiu plej certe okazos en Arrasate sub la ĉiĉeronumado de Josu Herrarte.

(Raportis: Nikolas Xil Carvalho).

Memoru pri la TTT-ejo de nia E-Grupo: esperantobilbao.tk

KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...

(Rigardu: <http://www.eventoj.hu/>)

15-17 marto 2013. Madrido. 9-a Iberia Renkontiĝo, organizita laŭvice de PEJ (Portugala Esperanto - Junularo), KEJ (Katalun(landar)a Esperanto - Junularo) kaj HEJS (Hispana Esperanta Junulara Sekcio).



3-5 majo 2013. 72-a Hispana Kongreso. Zaragoza. Informejo: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso>

21-23 jun.2013. Valencia Kongreso. En Oliva.

20-27 julio 2013. 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavík, Islando.

28 jul/04 aŭg 2013. SAT-kongreso. Madrido.
<http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html>



03-10 aŭg. 2013. 80-a kongreso de Itala E-Federacio. Sanremo-Castelaro.
<http://kongreso.esperanto.it>

Julio 2014. 99-a Universala kongreso. Bonaero (Argentinio).

H.E.F.

LA VORTARO « SOPENA » EN LA RETO.

La bonega (kvankam iom malnoviĝinta) vortaro Sopena elŝuteblas laŭ pdf-formato, sed nur bilda (skanita), kio malebligas uzi serĉilojn por la vortoj. Ĝi troveblas en la nova fako "LIBREJO" de Facebook:

Librejo: <https://www.facebook.com/groups/librejo/files/>

Sopena: <https://www.facebook.com/groups/librejo/328038820645259/>

(Dario Rodríguez. 06/01/2013)

PRI SOTOS OCHANDO.

La E-Grupo de Albacete BSO havas en sia nomo la akronimon de Bonifacio Sotos Ochando, albacetano kiu, 7 jarojn antaŭ la naskiĝo de Zamenhof, kreis planlingvon nomata "Lengua Universal y Filosófica".

Detala analizo de tiu kurioza lingvo troviĝas en la esperanta vikipedio:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Universal_%28Sotos_Ochando%29

La spertuloj pri planlingvoj povos legi la Gramatikon, kaj aparte, la Vortaron de tiu lingvo, per jenaj ligiloj kondukantaj al Google-books, en kiu eblas legi la tekston kaj, eĉ pli interese por ili, elŝuti la libron, laŭ pdf formato, per la menuo aperanta ĉe la dekstra supra parto sub la simbolo "dent-rado".

http://books.google.es/books?id=dPtrIMJcNegC&printsec=frontcover&hl=es&source=gs_qe_summary_r&cad=0#v=onepage&q&f=false

http://books.google.es/books/ucm?vid=UCM5326067571&printsec=frontcover&redir_esc=y#v=onepage&q&f=false

Iom pli komplika ol Esperanto, ĉu ?

(Darío Rodríguez. 16/01/2012)

TRA LA MONDO ...

POR FILATELISTOJ: POŝTMARKO PRI LA UNUA LIBRO.

Por omaĝi la 125-an datrevenon de la lingvo Esperanto, UEA jam duan fojon mendis ĉe la nederlanda kompanio PostNL porokazan poŝtmarkon. En aprilo aperis poŝtmarko kun la simbolo de la jubilea jaro. La nova poŝtmarko montras la kovrilon de la Unua Libro, kun la nederlandlingva teksto *Eerste leerboek Esperanto 1887-2012* (t.e. unua lernolibro de Esperanto 1887-2012). Ĝi validas por afranki normalan unuaklasan enlandan.

La poŝtmarko estas vendata en blokoj de 10 markoj. Unu bloko kostas EUR 6,00 (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla). Oni povas mendi ĝin ĉe la Libroservo de UEA.

(Darío Rodríguez. 19-11-2012)

RETEJO KUN E-LIBROJ.

Leginte mesaĝon de Raúl Salinas en la grupo Esperanto de Facebook, en kiu li informis pri la eblo elŝuti belegan pdf-eldonon de "La eta princo", de Antoine de Saint-Exupéry, mi konstatis la ekziston de retejo kiu enhavas multnombrajn kolekton de esperantaj libroj, kelkaj el ili savitaj el la malnova retejo de Franko Luin.

Raúl citis ligilon al : http://cindymckee.com/librejo/eta_princo.pdf

Mi serĉis la devenan paĝon kaj, mirigite, mi konstatis ĝian riĉan enhavon:

<http://cindymckee.com/librejo/>

(Darío Rodríguez. 12-12-2012)

Ĉu esperantista papigeblulo? Verŝajne, ne.

Dum tiuj ĉi tagoj, iuj homoj emas veti pri la "papivuloj" au "papigebluloj", t.e. pri la plej bonaj kandidatoj fariĝi nova Papo. Do, en multaj komunikiloj aperas biografioj de plej diversaj kandidatoj-kardinaloj. Mi trovis biografion de kardinalo kiu parolas Esperanton.

Vidu tiun ĉi artikolon pri lia Eminenca Moŝto Malcolm Ranjith, primaso de Srilanko kaj ĉefepiskopo de Kolombo:

http://www.teinteresa.es/religion/Cardenal-Malcolm-Ranjith-sri-lanka-perfil_0_868114629.html

Li parolas 11 lingvojn, inter kiuj Esperanton.

(Toño del Barrio. 19/02/2013)

GRAMATIKAĴOJ

> Ĉu Mankas akuzativo en la vorto germana? "Ŝi lernis krom la germana, la anglan, francan, latinan, tre mallonge la rusan kaj scipovis iom paroli pole".

Akuzativo post la vortoj anstataŭ, krom, kiel, kvazaŭ.

Post tiuj vortoj la uzado de akuzativo dependas de la senco, kiun ni volas esprimi. La afero estas, ke en kelkaj okazoj la aparteno de tiuj vortoj al aliaj fraz-membroj povas esti neklara. Ekzemple, la frazo Anstataŭ knabo patrino batis la hundon teorie povas esti dusenca: 1. Patrino komence volis bati knabon, sed fakte ĝi batas hundon; 2. Komence estis la knabo, kiu devis bati hundon, sed fakte tiun laboron faras la patrino.

Por malebligi tiun dusensecon oni uzu tre simplan regulon (formeblan el la ĝeneralaj reguloj pri akuzativo): se post la vorto anstataŭ, krom, kiel, kvazaŭ sekvas vorto sen akuzativo, do ĝi estas subjekto de la ago; se kun akuzativo – do ĝi estas objekto de la ago. Por esprimi la sencon, listigitan unue, oni uzu la formon Anstataŭ [bati] knabon patrino batis la hundon. Oni povas diri, ke temas pri ellaso de la verbo bati ĉi tie.

En kelkaj okazoj, kiam la kunteksto malebligas miskomprenon, oni emas ellasi akuzativon en tiaspecaj frazoj, sed entute tio ne estas rekomendinda. Ekzemple, la frazo #Anstataŭ pomoj ni manĝis prunojn estas klare unusenca (ja estas klare, ke pomoj ne povis manĝi; do la frazo havas la unusolan sencon – komence ni volis manĝi pomojn, sed fakte ni manĝas prunojn). Tamen pli logika, klara kaj rekomendinda formo estas Anstataŭ pomojn ni manĝis prunojn.

Malpli ofte similaj situacioj povas okazi ankaŭ kun aliaj vortoj. Ni donu nur kelkajn ekzemplojn:

Ni krom Petro vizitis ĉiujn – vizitantoj estis ĉiuj, escepte de Petro.

Ni krom Petron vizitis ĉiujn – oni vizitis preskaŭ ĉiujn, sed ne Petron.

Estas klare, ke eblas atingi bonan rezulton ankaŭ per alia vortordo kaj uzado de reliefigaj helpvortoj, ekz, Ni sen Petro vizitis ĉiujn aŭ Ni vizitis ĉiujn, escepte de Petro.

Mi salutas vin kiel prezidanto – fakte, prezidanto estas mi, kaj en tiu rolo mi salutas vin.

Mi salutas vin kiel prezidanton – estas vi, kiu estas prezidanto, kaj mi salutas vin.

Por fari la unuan sencon klara oni proponis uzi la vorton estiel (en la rolo de..., estante mem...), sed ĝi ne estas vaste uzata. La supre prezentita distingiga modelo estas preferinda.

(F.J. Moleón. 15-01-2013)

Memoru la bazan regulon: post "krom" kaj "po", ne estas regulo.

(Toño del Barrio. 15-01-2013)